

NOVEMBER, 1919



OFFICIAL ORGAN OF

THE ESPERANTO ASSOCIATION

OF NORTH AMERICA

AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN of

The Esperanto Association of North America, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto,

CO-EDITORS: NORMAN W. FROST H. M. SCOTT

MRS I M. HORN

CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups through-out the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

BERKELEY, CALIF BERKELEY, CALIF, Berkeleya Esperanta Rondo.—Classes Monday and Tuesday evenings at 8.00.—Meetings Thursday evenings at 2508 Vine St. Address Vinton Smith, 530 62nd St., Oakland, Calif,

Oakland, CALIF.
Oakland Esperanta-Rondo; L. D. Stockton,
Sec. & Treas., 438 15th St.

Sec. a freas, 350 Jin 50.

SAN FRANCISCO, CALIF.
San Francisco Rondo, meets Third Friday
evc., 406 Kearny St.
F-ino M. D. Van Sloun, Sec'y, 946 Central Av.

MONTREAL, CANADA.

Montreal Esperanto Society, Group No. 1. Room 13, Tooke Bldg., St. Catherine St. Meets Wednesday evening at 8,00 o'clock.

Meets Wednesday evening at 8:00 o'clock.
BRIDGEPORT, CONN.
Bridgeport Esperanto Society meets every Friday at 7:30 P.M. At 284 Dover St., near
Remington Arms. S-ro Gustavus McGroirty
Sck., 525 Fairfield Av. Marcus L. DeVine,
Pres., 284 Dover St. Visiting Esperantists
call Barnum 1294-Ring 13. 19

WASHINGTON, D. C. La Kabea Esperanto Klubo meets every Sat-urday, at 8.30 P. M., at Room 313, Y. M. C. A. Bldg., 1736 G St., N. W., Washington, D.C. Kolumbia Esperanto Unuigo. Public meeting third Wednesday of each month except July and August at Public Library. Club meetings each Wednesday evening excent third at 20 Randolph Place, N. W. All Esperantists in

CHICAGO ILLS.
La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park.
Jaroslov Sobehrad. Sec'y. 1116 W. 19th Place. La Esp. Oficejo. 1669 Blue Island Ave. Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate.

BOSTON, MASS. Boston Esp. Soc., 402 Pierce Bldg., Copley Sq. Meets Tues., 7 P.M. Miss A. Patten, Sec.

WORCESTER, MASS. Worcester County Esperanto Society, Business Institute, every Friday, 8.00 P.M.

PORTLAND, ME. Portland Esperanto Society. Tre'awny Bldg. Miss Emma Sanborn, Sec'y, 16 Conant St.

DETROIT MICH.
Detroit Esperanto Office. 507 Breitmeyer
Bldg., open daily. Library at disposal of
everybody daily. 7 A,M-9P.M., except Tues,
and Fri. Classes meet Tues. and Fri. S.10

La Pola Esperanto Asocio, B. Lendo, Sek., La Pola Esperan. 120 20th St. MANCHESTER, N. H. MANCHESTER, N. H. 19

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the twoadditional. The heading,-name of city or town-is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secre-

PLAINVIEW, NEBR.
Esperantos-Fako de la "Sola Skolto" (Lone
Scout), 500 N. Dearhorn, Chicago, Ill. (Revuo por la Junularo, Organizu grupon inter
la geitaboj. Granda sukceso. Abou tuji
Jare. 75; Kvarmonate. 25.)
Pakestro, Chas. P. Lang, Palinview, Nebr.

HEBRON, NEBRASKA. HEBRON, NEBRASKA. La Hebrona Grupo kunvenao ĉiun Jaŭdon 8 P.M., 660 Olive Ave., kaj ĉiun Dimanĉon 10 A.M., 500 Olive Ave. Roland Jeffery, Pres., Harry Hogrefe, Vice-Pres.

Harry Rogrefe, Vice-rres, HOBOKEN, N. J.

"LO.O.F. Esperanto Club No. 1 of Greater
"LO.O.F. Esperanto Club No. 1 of Greater
N.Y.' meets every Toesday at 8.30 P.M. in
61 First St., 3rd Floor West. All welcome.
All O. Haugintly. See y Meets
all communications to the secretary at above

BUFFALO, N. Y. Buffalo Esperanto Society, A. E. Warren. Press.; Miss Ray Morris, Sec.; meets Thurs-day evenings at 60 High St.

day evenings at 60 High St.

19 NEW YORK CITY, N. Y.
The Greater New York Esperanto Society,
The Greater New York Esperanto Society,
Including all Chartered chief in Maniatta,
Including all Chartered County and the
New Jersey suburbs, Miss Leonora Steeppler,
S. S.
The New York, Parco, or Esperanto supper, is held on the THIRD FRIDAY of every
month (E.30 P. M.). Hotel Albert, Cor. 11th
The Cor. 11th
The

CLEVELAND, OHIO. La Zamenhofa Klubo; S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

PHILADELPHIA, PA.
Phila Esp. Soc. J. F. Knowlan, Sec., 45 No.
13th St. Meets 4th Fri., Bingham Hotel, 11th
and Market Sts.
Rondeto de Litovo-Polaj Esperantistoj, 2811
Livingston St.

Esperanta stelo de Polujo.. Sekr., S. Zysk. Kunvenas mardon vespere inter 8-10 h., 561 N. York Ave.

PITTSBURGH, PA.
Esperanto Sec., Academy of Science and Art.
James McKirdy, Sec., Box 920. Fridays, 8

MILWAUKEE, WISC. Hesperus Esperantists. S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Av., 3d Tuesdays, 8 P.M. 19

Amerika Esperantisto

American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

A true translation of the non-English portion of this magazine filed with the Postmaster. Boston. Mass.

Published Monthly by

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.) WEST NEWTON, MASS.

One Dollar a Year.

Du Spesmiloj Jare.

. Single Copy Ten Cents.

VOL. 25

NOVEMBER, 1919

No. 2

THE ETHICAL BASIS FOR ESPERANTO

A CHRISTMAS SERMONETTE

The Christmas season is coming on apace, and all of us who have warmth and food must remember that there are still thousands shelterless and starving because of our lack of ability to overcome the attitude of hate and separation, and install true Peace.

It is sometimes called in question whether Esperanto will promote peace as claimed. We believe it will, but how can we surely prove it? Many cures have been suggested and so many hopes have proved to be vain! Can we trust in anything especially in these days when the great projects of world union totter on their uncertain feet? Let us examine the matter carefully and dispassionately: first, to take well known facts —

Bacon said, "Cogito, ergo sum." "I think, therefore I am." The mental life has the reality. In the human one can certainly say still further, "I think in words, therefore I can reason." To a great extent the words that I use govern my spiritual life upon earth. The words that I hear have great effect, too; the orator or the teacher who uses repetition can often convince by that alone; the heard word becomes a part of the mentality of the hearer. Many of our sentences are mere parrot-like utterance of what we have heard or read, with little care as to our real idea and its exact expression. To a considerable extent our words limit our thought and even our wishes. In every community there grows up a common body of thought. Each language thru its newspapers, its travellers, accumulates a mental store of its own. If one mental store of ideas, words, and sentiments becomes sharply diverse from a neighboring mental store, there are almost sure to be

٠.

points of disagreement; of divergence of ideals; of conflict of ideas of rights and the right. When such a spiritual conflict between nations arises, there are almost always misconceptions and the appeal to force, i. e. from mental to mental and material conflict — or war.

When there exists a common international language in which all national spiritual stores are reflected and where they mingle, there is certain to arise an international spiritual body of common ideas and ideals which, remaining a unit, will not give rise to miscomprehensions, hence not to a resort to force. This spiritual body or world's public opinion is then the antithesis of war. It is not the qualities of the language itself that counts, but the fact that there exist a world-wide international complex of ideas that gives hope for peace; that is the Brotherhood of Man. There may always be minorities, birds that fly apart from the flock, but there will always be one flock which may pursue its course certainly and wholeheartedly whither it will. Truly, is not this the way of Peace and Progress?

Consider a specific instance: for forty years France read of the attempts to Germanize Alsace-Lorraine, of the protests of the land, of the fervid loyalty of the people there to the beloved France. The school children throbbed over it; the oldest and calmest were "quick" to the matter. Here was one definite spiritual unity. Meantime over the border, the German schools taught of how the great military leaders had raised up Germany and rescued Elsass and Lothringen from their centuries of slavery to the alien French, and given them the blessing of German rule. Here was another definite spiritual unity of belief and thought. It is no part of our purpose to express any judgment in the matter, other than to claim that in it lay a sure seed of the late war.

Now, let us examine what Esperanto widely accepted—let us say, taught in all the elementary schools— would have done. The French viewpoint written in the common language would have been read thruout Germany; the German stand understood by all France. Difficult tho it may seem, the truth of the matter would have grown up into the recognized world's public opinion, and the falsehood, like false witness an any open court-room, could not have long maintained itself. The world's judgment would not have needed millions of slain, crippled and blinded, and floods of hate to impose itself.

The common spiritual unity does not come unsought; is not a sudden undeserved gift. We, who know and feel these things as Esperantists, can not come into our full heritage of acheivement without effort. the hates and the divergencies of this world are scarcely beginning to ebb. Shall we be wanting in this hour of opportunity?

Junulino — Patro, ĉu vi konas la funebraĵiston, kies butiko estas en nia strato?

Patro — Jes, kial?

Junulino- Li diras, ke li ne faros negocon kun iu krom kutima kliento.

⁻Esperanto Monthly.

LA RONDO FAMILIA

(Oni proponas uzi tian paĝon por aferoj interesaj al la mondesperantistaro. Kompreneble, ĝi koncernos statistikon, kiu helpos respondi al la ofta demando de la ne-esperantistoj: "Kiel progresas la lingvo?" Bonvole precizigu ĉiujn la donatojn, ĝis la fina cifero.)

KOMUNIKA KONGRESO

Boston, Mass, Usono. Jan.1 — Jul. 1, 1920 okaze la

Tricentjaran Datrevenon de la Elŝipiĝo de la "PILGRIMAJ PATROJ"

1620 - 1920

Ciuj Esperantistoj, individue aŭ grupe, partoprenu! Sendu al ni komunikojn (letere aŭ poŝtkarte) esprimante sentojn, konsilojn, konstatojn, demandojn, ktp., rilate al la Esperanta movado. Tiujn ni redaktos por longa raporto en la Amerika Esperantisto, eble kun raportetoj en la ĝistiamaj eldonoj. La rezulto, laŭ nia opinio, nepre helpos la centrigon de ideoj kaj faktoj.

Sendu baldaŭ, se eble, al la adreso:

Bostona Esperanta Societo, 402 Pierce Building,

Copley Square, Boston, Mass. U. S. A.

Se oni deziros personan respondon al demandoj bonvolu enmeti respondkuponon.

Xa KONGRESO

Paris, Sept. 15, 1919.

Per circulero de Aprilo, 1919, ni sciigis ke la sumoj senditaj al la Deka Kongreso por mendoj estas repagotaj al la Kongresanoj post malpliigo por la elspezoj faritaj de la diversaj Agentejoj.

Post nova ekzameno de la demando kaj esploro de la kalkuloj, ni konsideris, ke ni povas uzi la renton de la kapitalo, kiun ni havis je nia dispono dum la militperiodo, por repagi la diritajn monsumojn sen ia dekalkulo kaj preni sur nin la sendelspezojn de la dokumentoj kaj poŝt-mandatoj.

Ni ankaŭ pridiskutis la demandon pri monŝanĝo, kaj decidis ĉar la pagoj estas faritaj al la kaso de la Kongreso per frankoj (vidu dorsflankon de la aliĝiloj), ke ni ankaŭ repagos per frankoj.

La Kongresanoj, kiuj intencas oferdoni tute aŭ parte al la Kongresa kaso aŭ al la Franca Societo por propagando de Esperanto la sumon al ili ŝuldatan bonvolu sciigi nin pri sia intenco.

Ni petas la Kongresanojn ĉiam memorigi la numeron de ilia kongresa karto.

Loka Organiza Komitato de la Deka Kongreso de Esperanto.

GEMS OF ESPERANTO LITERATURE

LA TRI GUTOJ

Albo, la bona feino, kiu zorgas pri la fiancinoj, Albo, kiu loĝas en la okulo blua de l' virgulinoj senpekaj, pasante iam matene apud rozo, aŭdis sian nomon elparolatan de tri gutoj tremantaj. Proksimiĝante kaj sidiĝante en la koron de l' floro, ŝi demandis afable:

"Kion vi volas de mi, gutoj brilaj?" — "Venu solvi demandon," diris la unua. — "Diru kion." — Ni estas tri malsamaj gutoj, naskiĝintaj diversdevene; ni volas, ke vi diru al ni, kiu el ni estas la plej merita, kiu estas la plej pura." —"Mi konsentas; parolu, guto brila."

Kaj la unua guto tremante parolis: "Mi venas el nuboj altaj, mi estas filino de l' grandaj maroj. Mi naskiĝis en la senlima oceano antikva kaj potenca. Vizitinte marbordojn kaj marbordojn, en mil fulmotondroj skuegita, mi estis sorbita de nubo. Mi iris ĝis la altaĵoj, kie brilas la stelo, kaj ruliĝante de tie, inter fulmoj, mi falis en la floron, en kiu mi nun ripozas. Mi reprezentas la maron." —"Estas nun via vico, guto brila," diris la feino al la dua. — "Mi estas la roso, kiu nutras la liliojn; mi estas fratino de l' opalaj lunbriloj, filino de l' nebuloj, kiuj sin malvolvas, kiam la nokto mallumigas la naturon. Mi reprezentas la matenkrepuskon." — "Kaj vi?" demandis Albo la plej malgrandan. — "Mi havas nenian indon." — "Parolu; el kie vi venas?" — "El la okuloj de fianĉino; mi estis rideto, mi estis kredo, mi estis espero, poste mi estis amo, — hodiaŭ mi estas larmo."

La aliaj ridas je l' guteto, sed Albo, malfermante siajn brakojn, prenas ĝin kun si kaj diras: "Tiu ĉi estas la plej merita, tiu ĉi estas la plej pura." — "Sed mi estis la maro!" — "Kaj mi estis l' atmosfero!" — "Jes, tremantaj gutoj; sed tiu ĉi estis la koro." — Kaj ŝi malaperis en la bluaĵo, portante la humilan guton.

el Esperantaj Prozaĵoj.

This month's selection is from the Portuguese, translated into Esperanto by a Portuguese.

These selections are designed to give some small idea of the scope and richness of Esperanto literature. The English translation, while idiomatic, has the single aim of representing as faithfully as possible the Esperanto text. Of course, like every living language, the international has also its untranslatable elements, and only the adept can appreciate their beauty and possibilities in the hands of masters. The appended notes are not meant for beginners, and are critical and literary rather than pedagogical in their nature.

Patrino — Tomĉjo, ĉu vi estas sufiĉe altkreska por akiri tiun botelon sur la breto en la kuirejo?

Tomĉjo — Ne, se ĝi enhavas mian ricinan oleon.

Ho Ho trad.

FOR THE STUDENT

THE THREE DROPS

Alba, the good fairy who watches over betrothed maidens, Alba, who dwells in the blue pupil of sinless virgins, while passing one morning by a rose, heard her name pronounced by three trembling drops. Drawing near and seating herself in the heart of the flower, she kindly asked, — "What do you want of me, brilliant drops?" — "Come and settle a question," said the first. — "What is it?" — "We are three different drops, born of diverse ancestry; we would have you tell us which of us is of the highest merit, which of us is of greatest purity." — "I consent; speak, brilliant drop."

And the first drop trembling spoke: "I come from high clouds, I am daughter of the great seas. I was born in the boundless ocean, ancient and mighty. After visiting shores upon shores, dashed about in a thousand storms, I was drawn into a cloud. I went to the heights where the star shines, and tumbling thence, amid lightnings, I fell into the flower in which I am now at rest. I stand for the sea." — "It is now your turn, brilliant drop," said the fairy to the second. —"I am the dew which feeds the lilies; I am sister of the opal moonbeams, daughter of the mists which unfold when night darkens nature. I stand for the morning twilight." — "And you?" Alba asked the smallest. — "I have no worth." — "Speak; whence come you?" — "From the eyes of a betrothed maiden; I was a smile, I was belief, I was hope, then I was love, — today I am a tear."

The others laugh at the tiny drop, but Alba, opening her arms, takes it with her, and says, "This drop is of highest merit, this is of greatest purity." —"But I was the sea!" — "And I was the atmosphere!" — "Yes, trembling drops; but this was the heart." — "And she disappeared in the blue, bearing the humble drop.

From Coelho Netto (translated by Dr. J. Avellar in Esperanto Prose Selections.)

NOTES

Albo, the original form is probably Alba, with the common feminine ending of the Latin tongues (derivation likely from Lat. albus, white). Usage is very evenly divided as to "Esperantizing" proper names, that is, making them end in -o. There is no rule, and authors seem to follow their whims. The more commonly used "Christian" names generally have the -o ending (as Johano, Mario, etc.), but Zam. has Marta, Jakob, Rahel, etc. The matter is of no importance, as the capital letter and the context render proper names unmistakable without the -o. —Dist. fianĉino and novedzino, the two being separated by the edziĝa soleno. — pupilo blua....virgulinoj senpekaj: the position of the adjective in Esperanto is theoretically optional; but the usual place is before the noun: the present author follows the usage of his mother tongue rather more than the best Esp. style. — koron, why accusative?

Diversdevene, the succinct compression in the adverbial form is thoroly characteristic of Esp. — kiu el ni: kiu has here its primary sense of "which." — parolu....elparolatan (above), what is the distinction between paroli and elparoli (in the linguistic sense elparoli is now often replaced by prononci, but elparoli has a broader sense than

the neologism).

Senlima oceano antikva kaj potenca, here the position of the adjectives is dictated by euphony and emphasis. — marbordojn kaj marbordoin: the expression has an idiomatic flavor, but is perfectly clear, and in keeping with the spirito de la lingvo (cp. tre kaj tre multe da jaroj, F. K. 285). - fulmotondro, the usual word for a "thunder-Dist. ventego, a wind storm. Our simple "storm" has no equivalent in classical Esperanto. — skuegita, note the force of the word, difficult to translate. - Dist. sorbi and absorbi, the former almost always material, the latter figurative in "absorption." — vico has three common meanings: can you give them? — indo in common usage always has a moral sense, which valoro lacks. As in other languages, the older roots in Esp. have a more general and "spiritual" sense, while more specific material sub-senses are more and more taken up by newer roots. Cp. elparoli and prononci above. The study of synonyms is as profitable, if not more so, in International as in our mother tongues.

Ridas je, might also be ridas and accusative, but ridi AL (usually rideti al) has a different sense. — l' atmosfero, this elision, while unexceptionable grammatically and having the sanction in usage of some of the earliest writers of the language, is, nevertheless, not accounted the best style, Zam. himself admitting elision of the article in prose

only after a preposition ending in a vowel (Ekz. sek. 27).

BEST TRANSLATION

Usonanoj kiuj, antaŭ la tutmonda milito, kontentigis sin en la sentado ke ili vivas en la plej monhavanta lando de la mondo kaj fanfaronis pri senlimaj vivrimedoj, konvinkiĝis de la konservado kaj prezregulado, ke ja ekzistas limoj rilate vivrimedojn kaj ellaboraĵojn eĉ en Usono. Ili nun pli respekte kaj pli alttakse konsideras la vivrimedojn de aliaj landoj. Surprize ili sciiĝas, ke en Brazilo troviĝas netuŝitaj virgaj arbaroj, kalkulataj je kvarono de la staranta ligno en Usono. Urugvajo sendas al Usono okonon da ĉiuj lanaj importaĵoj de ĉi-tiu lando, kaj nun okupas la trian lokon rilate la sendadon de bestofeloj al Usono, superigata nur de Argentino kaj Brazilo.

trad. W. H. Smith, Concord, N. H.

Al unu bonekonata novelistino oni iam demandis kial ŝi ne estis edziĝinta.

"Mi havas tri aĵojn ĉe mi—ŝi diris—kiuj tiom ĝuste reprezentas la ecojn de homo ordinara ke el li mi ne bezonas pli.

Pri kio vi parolas?—demandis ŝia amikino.

Jen!—respondis la novelistino—Apartenas al mi hundo kiu ĉiumatene grumblas, papago kiu ĉiuposttagmeze blasfemas, kaj kato kiu la tutan nokton restas for la domon.

el "Our Dumb Animals," trad. Prujno

LA SPEGULO

Norde, apud Niemen, estas alveninta dekkvinjara kreolineto, blanka kaj rozkolora kiel floro de migdalujo. Ŝi venis el la lando de la kolibroj; la vento de l'amo kunblovis ŝin. Tiuj de ŝia insulo diris, "Ne foriru! Frostas tie sur la kontinento..... La vintro mortigos cin... Sed la kreolineto ne kredis pri la vintro kaj konis la malvarmon nur tial ke ŝi iafoje trinkis aŭ manĝis glaciaĵojn; plie ŝi estis amanta, ŝi ne timis la morton. Nun ŝi elŝipiĝas en la Niemenaj nebuloj kun siaj ventumiloj, sia pendlito, siaj kulvualoj, kun kaĝo el ornamita plektaĵo plena je birdetoj el sia lando.

Kiam la maljuna patro Nordo estas vidinta tiun insulan floreton, kiun gaja Sudo sendis al li en radio, li kortuŝiĝis pro kompato kaj ĉar li prave opiniis, ke la frosto tuj mortigos la knabinon kaj ŝiajn kolibrojn, li rapide ekbruligis sian grandan flavan sunon kaj vestiĝis per somero, por akcepti ilin.... Tio trompis la kreolinon; ŝi kredis ke tiu norda peza varmeco estas longdaŭra, tiu eterna nigraverdaĵo estas printempa; do, alkroĉinte sian pendliton inter du abiojn en la centro de la parko, ŝi ventumas balanciĝante la tutan tagon.

"Sed estas tre varme en Nordlando," ŝi diras ridante. Tamen, io maltrankviligas ŝin. En tiu stranga lando, kial la domoj ne havas balkonojn? Kial tiuj dikaj muroj, tiuj tapiŝoj, tiuj pezaj tapetoj? Kial tiuj fajencaj fornegoj kaj tiom amasego da ligno kiun oni kunportis sur la korto? Kial tiuj manteloj kun dika subŝtofo, tiom da felaĵoj kiuj dormas en grandegaj ŝrankoj? Por kio kaj kiam, ĉi tio utilas?...Malfeliĉa knabino, ŝi sciigos ĝin tro baldaŭ.

Iun matenon, ekvekiĝante, kiom la kreolineto frosttremis! Kie estas la suno? De la nigra ĉielo kaj malalta, kiu ŝajne alproksimiĝis al la tero nokte, falas ere pluŝo blanka kaj silenta, kiel sub la kotonarboj. Jen la vintro! Jen la vintro! La vento blovas, la fornoj ronkas. En sia ora kaĝo, la kolibroj ne plu pepas. Iliaj flugiletoj bluaj, roz- aŭ rubenkoloraj, marverdaj estas senmovaj. Kompatindaj, kun siaj delikataj bekoj, siaj okuloj similaj je kapetoj de pingloj, ili premas sin unu kontraŭ la aliaj, rigidaj kaj ŝvelitaj pro la malvarmo. Tie, en la fundo de la parko, la pendlito frosttremas ŝarĝite per prujno, la abioj ŝajnas el ŝpinita vitro.... La kreolineto estas malvarma, ŝi ne plu volas eliri.

Apud la fajro, kvazaŭ volviĝita kiel siaj birdetoj, ŝi pasigas la tempon rigardante la flamon, kaj faras por si sunon el siaj memoraĵoj. En tiu granda kameno luma kaj varma, ŝi revidas sian tutan landon: la larĝajn kajojn banatajn de la sunbrilo kun la bruna siropo kiu disfluas el la sukerkanoj kaj la maizerojn kiuj dancas en orita polvo, la lampirojn kaj milionojn da etaj flugiloj kiuj zumadas ĉirkaŭ la floroj kaj inter la tulaj maŝoj de la kulvualo.

Dum ŝi tiel revadas antaŭ la flamo, la vintraj tagoj sekvas sin, ĉiam pli mallongaj, ĉiam pli malhelaj. Ĉiumatene, oni forprenas el la kaĝo unu mortintan kolibron; baldaŭ nur restas du! du flokoj el verdaj plumetoj kiuj premas sin, unu kontraŭ la alia en angulo.

Tiun matenon, la kreolino ne povis ellitiĝi. Estas mallume! Estas malvarme! La vintro paralizas ŝin. La prujno metis sur la vitrajon dikan kurtenon el maldiafana silko. La urbo ŝajnas mortita; tra la stratoj la vaporbalailo por neĝo fajfas plorindege. En sia lito, por amuzi sin, la kreolineto lumigas la brilaĵetojn de sia ventumilo kaj rigardadas sin en patrolandaj speguloj ĉirkaŭitaj per franĝo el indiaj plumoj.

Ciam pli mallongaj, ĉiam pli malhelaj, la vintraj tagoj sekvas sin. Sub siaj puntaj kurtenoj, la kreolineto konsumiĝas, ĉagrenegiĝas. De sia lito, ŝi ne povis vidi la fajron; tio ege malesperigas ŝin. Estas kvazaŭ ŝi estas perdinta duan fojon sian landon. De tempo al tempo, ŝi demandas: "Ĉu estas fajro en la ĉambro? —Certe, karulineto! Flamego plenigas la kamenon. Cu vi ne aŭdas kiel la ligno kraketas, kiel la pinpomoj dispeciĝas? -Ho! montru! Ke mi vidu!" Vane ŝi sin klinas! Vane ŝi sin streĉas! La flamo estas tro malproksime, ŝi vidas nenion; tio malesperigas ŝin. Iun vesperon, ŝi estas revema, pala, la kapo sur la bordo de la kuseno, la okuloj al tiu nevidebla flamo tiel bela; ŝia amiko alproksimiĝas, prenas unu el la speguloj kiuj kuŝas sur la lito: "Cu vi volas vidi la flamon, amikino? Nu! atendu...." Genufleksinte antaŭ la kameno, li provas sendi al ŝi, per la spegulo, la rebrilon de la magia flamo. "Ĉu vi vidas? — Ne! Nenion! — Kaj nun? - Nenion ankoraŭ!...." Subite, ricevante ĵus sur la vizaĝo, ŝprucon da lumo, kiu ĉirkaŭas ŝin: "Ho! mi vidas ĝin!" diras la kreolineto, tute felica kaj ŝi mortas ridante, du fajrerojn en la fundo de la okuloj.

el Lundaj Rakontoj, de A. Daudet, trad. Jeanne Dorsinfang

GAZETARO ESPERANTISTA

Mi celas fari studon bibliografian de la tuta esperantista gazetaro aperinta de 1888 ĝis nun. Por povi bone eltiri ĉiujn detalojn kaj la konvenan fotografaĵon de ĉiuj ĵurnaloj, mi nepre bezonas posedi almenaŭ po unu ekzempleron de ĉiu. Mia arhivo enhavas jam pli ol 500 ĵurnaloj, sed mankas ankoraŭ en ĝi la jenaj aperintaj en Usono:—

Bulteno de la VIa Internacia Kongreso—Washington—1912 Esperanto (eldonita de la Pola grupo) —Chicago—1913 Philatelio Esperanto—Buffalo— Pola Esperanta Revuo—Chicago—1913 Stelo Esperanta—Philadelphia—1911

Al ĉiu persono kiu havigos al mi po unu ekzempleron da iuj el tiuj jurnaloj, mi rekompense sendos al li kolekton de 200 diversaj belegaj Esperantaj sigelmarkoj. Mi tutkore dankos ĉiujn referencojn pri novaj gazetoj kaj pri malnovaj gazetoj malmulte gravaj kaj konataj. Helpu min en mia grava esperanta tasko.

S-ro Joan Amades-Peu de la Creu 10, Barcelona, Hispanujo.

Examinations: I have to report as passing the Elementary Exam. with a grade of 90 % E W. Gundy, 173 Spadina Road, Toronto, Can.

Chairman, Exam. Com.

ESPERANTA PAROLEJO

En sed ne pri Esperanto: ne pli ol 500 vortoj: por iu senpage: nomo kaj adreso postulataj In but not about Esperanto: not over 500 words: free to all: signature and address required

La "Mondpacligo Kruco Blanka" serĉas per Esperanto interrilatojn en ĉiuj landoj por atingi la fortplenan kunlaboron de la katolikoj en la servo de la popolinterkompreniĝo por kreo de forta kaj unueca internacia katolika pacmovado. Ni petas vian subtenon de niaj klopodoj per publikigo de aldonitaj notoj en via gazeto.

Koran samideanan saluton!

I.a "Mondpacligo Kruco Blanka" (sidejo Graz, Aŭstrio, Karmeliterpl. 5), kiu jam dum la milito laboris por la popolinterkompreniĝo, dufoje kuraĝita per lia papa moŝto, alcelas kunigi la tutmondajn katolikojn precipe, por gajni ilin por kunlaborado en la servo de la popolrepacigo. Ĝi uzas Esperanton laŭ ĝia regularo kiel sian popollingvon, kaj petas ĉiujn fremdlandajn samideanojn, kiuj volas partopreni je la nomitaj klopodoj, pri ilia adreso kaj pri la adresoj de samideanaj amikoj.

Lia papa Moŝto al "Mondpacligo Kruco Blanka."

La "Mondpacligo Kruco Blanka" (sidejo Graco en Aŭstrio), kiu laboradis jam dum la milito pri la pacunuigo de la katolikoj kaj alceladas "Katolikan internaciecon" je religia, sociala kaj kultura kunlaborado de la katolikoj ĉiulandaj, ricevis jenan leteron de la Vatikano la 15an de Septembro; "Kiel mi jam sciigis V. S. kun mia letero de 27a Junio, 1917, lia papa moŝto ĝojegas vidante, ke la katolikoj sub la duko de siaj pastroj estas kunlaborontaj, akordiĝante al la instruado de l'Evangelio, por repacigi kaj unuigi popolojn en la Kanto de Jesuo Kristo, kaj esperas, ke ili sukcesis malpliiganta la malamon kaj la malamikecon, kiuj nun disegas tiel grandan parton de la homaro."

Kard. Gasparri.

Ni kore petas publikigi la supran sciigon en hejmlanda lingvo en la gazetoj de via lando kaj sendi ekzemplerojn al "Blanka Kruco," Graz, Aŭstrio, Karmeliterplatz 5.

Akademia Mondjunularo Katolika, Amoko.

Fondiĝis en Breslaŭ ligo de katolikaj studentoj, kiu elvokas kaj petas ĉiujn en- kaj eksterlandajn samkredanojn (gestudentojn kaj gimnazianojn) pere de la ĉie konata mondhelplingvo Esperanto, aŭ, ĉe ties provizora nekono pere de Esperantisto, aranĝi leterkorespondadon, t. e. kunlaboradon (laboranaron) por la realigo de la postuloj de la Katolika Internacieco, t. e. la Mondpacligo Kruco Blanka, sidejo Graz en Aŭstrio.

Katolikaj gestudantoj ĉiulandaj unuigu vin! Ni do donu unu al la alia la manojn, malgraŭ la nacia diferenco por komuna fruktonaskiga laboro, por la progreso de la pacema laborado.

Vi zorgu por plej granda disvastigo de ĉi tiu alvoko en viaj land-

gazetoj kaj ĵurnaloj.

Oni tuj skribu al la centralejo.

Stud. teol. E. Piokorz, Breslaŭ, Germanio, Schwenkfeldstr. 15.

LA ENLANDA MOVADO

ESPERANTA RONDARO DE KALIFORNIO

La ĉiujara kunveno de la Kalifornia federacio de adeptoj je la lingvo internacia "Esperanto" okazis antaŭ ne longe en San Francisko. Prezidis Majoro Yemans kaj F-ino Van Sloun sekretariis. La paroladantoj libere uzis Esperanton. San Francisko sendis la plimulte da delegitoj. El aliaj urboj troviĝis L. R. Stockton el Oakland, kies gravega biblioteko de libroj Esperantaj lin faris la plej konata Esperantisto laŭ la bordo pacifika; el Berkeley, F. Postnikov kaj V. Smith, prez. kaj sekr. de la Berkeleya Rondo; el San Jose, S-ro Lane kaj Ŝ-ino Horn, antaŭe sekretario de la E. A. N. A. Oficejo, kaj ĉiam entuziasmulino; el Redwood, Ges-roj Mayers. La aferado de la kunveno enhavis la protokolon, legatan de F-ino Van Sloun; raporton pri la libraro de S-ro Stockton; kaj ĝeneralan diskutadon pri la propagando. La Esperantistoj el Kalifornio celas pligrandan agadon sekve de la kondiĉoj militadaj, klasojn, paroladojn ĉe la Y. M. C. A., ktp. Oni diskutis proponon ke ni gajnu permeson de verkistoj ke oni unue traduku iliajn verkojn Esperanten.

Oni elektis Prezidanto D-ro H. W. Yemans, majoron de la U. S. armeo; registra sekretario, F-ino Van Sloun, 942 Centre St., San Francisko; financa sekretario, V. Smith, Berkeley; bibliotekisto, S-ro L. R.

Stockton, Oakland.

Post la oficiala sekvis festa parto de la kunveno. Je kafejo oni festmanĝis, kun neformalaj diskutoj, deklamoj, paroladoj, k. t. p., ĝis malfrua horo. "Ĉeestis reprezentantoj el multaj profesioj kaj metioj; iuj el la membraro apenaŭ povis paroli anglan lingvon, almenaŭ ne tiom bone kiel la Esperanton; ŝajnas ke la kunilo Esperanto ilin kunligis — ke tiuj ĉi estis sciigitaj ke ĉiuj homoj estas fratoj."

elĉerpita de la "Berkeley Times, Oct. 18, 1919 kaj de letero de S-ro C. R. K.

Philadelphia Dum la lastaj semajnoj nova Esperantista grupo stariĝis en la "West Philadelphia High School for Boys" sub la direkcio de unu el la instruistoj, S-ro Hetzel. La instruo komenciĝis per metodo iom nova:—ĉiu eklernanto ricevis adreson de iu alilanda korespondanto kaj la dua leciono sur la murtablo estis la preparo de paragrafoj por poŝtkarta korespondado. Ĉiu vorto estis diskutata kaj oni sugestiis kelkajn aliajn uzeblajn vortojn kaj frazojn.

KVINA SABATO—Bostono La eknorma "5a Sabato" kunveno okazis ĉe S-ino George S. Davis, 27 Adelaide St., Jamaica Plain, la 29an de Novembro. Ĉiu ĝuis la okazon pro la renkonto de multaj ne-oftaj ĉeestantoj kaj pro la vortoj de la paroladantoj, D-ro Lowell, S-ro Lee kaj F-ino Meriam. Oni esprimis la deziron ke Prez. Payson legu iomete de unu el siaj novaj tradukaĵoj por aldoni intereson al la ĉiusemajnaj kunvenoj de la Bostona klubo. Kelkaj aliaj oferis sin kiel distriistoj ĉe venontaj kunvenoj de la klubo. La venonta 5a Sabato okazos la 31an de Januaro. Esperantistoj vizitontaj Bostonon, bonvolu atenti tion, kaj planu vian nepran ĉe-eston.





OUR EXCHANGES

We have received the following new exchanges, not heretofore reviewed, besides our regular exchanges.

Germana Esperantisto: A, propaganda, mostly in German (Roman type); and B, literature, in Esperanto—16 pages each closely printed, 3.60 M. per year; Dresden A 1, Struvestr., Germany.

Esperanta Praktiko: 16 pages, illustrated, in Esperanto and German; 5 M.; Berlin S. 59, Wissmannstr. 46, Germany.

La Progreso: a monthly of 8 to 12 pages, in Bohemian and Esperanto 6 K.; Plzen, Podebradova tr. 6, Cheko-Slovakia.

Itala Esperantisto: a quarterly bulletin in Esperanto and Italian, 16 pages, 5 fr. a year, published at Genova, Caselle Postale 922, will probably be merged in the proposed Itala Esperanta Revuo.

Hispana Esperantisto: is a 16 page all-Esperanto illustrated literary monthly, editor S-ro Julio Mangada Rosenorn, Komandanto de la Infanteria regimento Galicia 19, Jaca, Huesca, Hispanio; 2.400 Sm.

Universo: is an 8 page closely printed all-Esperanto organ for classified correspondents and collectors; with membership, 2½ Sm. per yr.,

Hungara Esperantisto: (May-Oct.) is a 16 page review mostly in Esperanto, 8 K. at Szentharomsag-utca 30, Szeged, Hungary.

Hungara Revuo: is a 4 page news-sheet giving the Hungarian point of view; 25 a yr., Budapest, VI, Hajos ulca 15. II. 2, Hungary.

La Esperantisto: (Sept.) is a 4 page news-sheet in Esperanto, 20 cents per year, Vieno II-1, Poŝtkesto 34 Austria.

Le Travailleur Esperantiste is a 4 page news-sheet in French and in Esperanto, organ of the French Socialist and labor-union Esperantists. 3 fr.; rue de Bretagne, Paris (IIIe).

Nia Folieto is a 6 page hektographed monthly issued by "La Progreso Esp. Club of Ghent; 7 respond-coupons per yr; Koophandelsplaats 11 La Unuigita Tuthomaro: a monthly of 16 pages in various languages parallel versions in other La Unuigita Tuthomaro: a monthan guages with a parallel Esperanto translation, largely devoted to world spiritualization; 10 M. per year; care of W. Heydorn, Hamburg 35, Germany. After the January issue the Esperanto version will appear as a separate version. at 7½ M. per year.

Catalunya Esperantista: an illustrated news-sheet in Catalonian

November—British Esperantist; Esperanto Monthly; Travailleur Esperantiste; World Salesman

October— Nia Folieto; Universo; Unuigita Tuthomaro; Germana Esperantisto, A. and B.; Eklezia Revuo; Holanda Pioniro; Esperanto Praktiko; Esperanto, U. E. A.; British Esperantist; Esperant Month-

ly; Svisa Espero; ktp.

Beginning with the Jan. issue, the British Esperantist will contain more literary matter and have a larger number of pages. Some very interesting selections from the Bible (Zamenhof's translation) as yet unpublished in any magazine have been secured. The Esperanto Monthly will no longer be published. The subscription will be at 2½ Sm. or 5 shillings. B. E. A. 17 Hart St., London, C.1, England.

RECENSA FAKO

U. E. A. Adresaro, for 1919: gives the names and addresses of delegates thruout the world so far as accurately attainable. Tho the volume is somewhat thinner than before the war, the information therein contained is of course more valuable than ever. Clubs in Usona not represented by a delegate should get busy at once and appoint one. Membership in the U. E. A. is a privilege every individual Esperantist should enjoy.

Humoraĵoj: Boucon —a booklet of jokes in Esperanto, well printed
.15 Sm. from Oskar Ziegler & Co., Markt- Tredowitz, Upper Fanconia, Germany.

BOOKS RECEIVED

Received and in course of review from Otava Esperanto Soc., Finnland La Botistoj

Batalo pri la Domo

Esperanto Legolibro de Vilho Setala

The Japan Peace Movement, vol. VII, no. 7, July, 1919, especially devoted to the Korean difficulties—in English and Japanese.

The Boy Scout Trail, vol. I, nos. 5 and 6, of Topeka, Kansas, —has an item calling attention to Esperanto.

Ireland an American Question: reprint from the Boston American.

The Irish Republic, Why? The Indictment, and several other leaflets issued by the Friends of Irish Freedom, 280 Broadway, New York.

The Mexican Review, an excellent monthly both in Spanish and in English, devoted to honesty and to better relations between us.

Gale's Magazine, addicted to rather extravagant statements in advocacy of radicalisms of every sort, some no doubt desireable.

Young Democracy, the Arbitrator, Equitist, Economist, Dumb Animals, etc., all welcome visitors.

KOLEKTISTOJ de ĈIUSPECAJ OBJEKTOJ

Oni intencas starigi kaj presigi tutmondan adresaron pri kolekt-

istoj de ĉiuspecaj objektoj.


Bonvolu do ĉiu kolektisto, sendi poŝtkarte la jenajn deklarojn: "Nomo, antaŭnomo, profesio, preciza adreso, objektoj de kolektado, lingvoj de korespondado, eventuala bank-konto."

La enpreso estos senkosta, la anoncado devigas al nenio.

Plenaj informoj sekvos pli poste. Oni skribu senprokraste kaj tre legeble al

S-ro Max Schrank Kempten, Bayern, Germanio.

In the Scientific American for October 4, 1919, we noted a letter by E. E. Porter of Carnegie, Pa., which voiced the crying need of an international language. Truly the ghost "will up" despite all the crushing inertia of the great body of specialists.



La Plej Maljuna Viro en la Mondo havas ĝojan veturadon en "Auto" kaj Aeroplano.

John Shell, de Lexington, Kentucky, Usono, 131 jara, laŭfame la plej maljuna viro en la mondo, estis unu el la elmontraĵoj ĉe la Kentucky State Foiro, en Louisville, Septembron, 1919.

Lia filino, laŭjare 97, pririgardis lin kun patrina zorgo. Li havis viruadon en aerroplanon kaj ĝuis tion je alteco de 600 futoj. Post tio, li veturadis en aŭtomobilo.

La kliŝaĵo montras S-ron Shell ĉe la gvidrado de la "Overland 4." Li havas ankoraŭ tempon por lerni Esperanton, ĉu ne?

Iun vesperon kiam malgranda Mario estis rompinta unu el la reguloj rilate al konduto ĉe la manĝtablo, oni forprenis ŝin de la familia manĝtablo kaj ŝin metis ĉe malgranda tablo en angulo, tie por manĝi ŝian vespermanĝon. La aliaj familianoj tiam ignoris ŝian ĉeeston.

Post silentperiodo la familio aŭdis ŝin donanta dankpreĝeton:

"Mi dankas al Vi, Sinjoro, preparinta por mi manĝtablon en la ĉeesto de miaj malamikoj."

Kaj jen la lasta fojo kiam Mario estas forprenita de la familia manĝtablo.

—el "Everybody's" trad. I. M. H.

Per sia lingvo vivas la Nacio: Per Esperanto vivos la Internacio. . . . Romain Rolland

KLIPLINGS

The Frankfort-on-Main Sample Exposition, Oct. 1 — 15, was a well-advertised affair, thanks to the agency of the Frankfort Esperanto group. 141 newspaper clippings in 20 tongues, including Japanese and Chinese suggest the efficiency of Esperanto as a commercial agent.

—Progreso

A card from Budapest announces the death on October 14 of one of the oldest and best known Esperantists, Jeno Forster, translator of "Fantomo en Lublo," U. E. A. delegate. and fervorulo.

The Bohemian Esperantists have decided to publish a library of Esperanto texts, including E.-Boh. and Boh.-E. vocabularies, grammar, reading book, etc.—Progreso.

The Esperantists of Bohemia are making great efforts to put Esperanto into the school curriculum with considerable prospects of success, thanks to the approval of S-ro Haberman, Minister of Public Education.

The Esperanto Rondo of Krasnaja Rjechka, E. Siberia, has been enjoying the reading of Sub la Meznokta Suno. They are inclined to question whether a pole-cat ever eats grass.

Esperanto is especially active in Portugal among Socialist and labor circles. At the eighth congress of the Socialist Party held at Figueira da Foz, the Esperantist Socialist Society procured the following favorable action. The Congress decided that 1. the new edition of the Rules of the Socialist Party is to contain an article making it a duty of all Socialists to fight for Esperanto; 2. every Socialist organization is to designate two of its members to learn and later teach Esperanto to the membership.

—Travailleur Esperantiste

The Lodz Esperantists gave an entertainment August 10th in the Manteufel Gardens. In the audience was the mayor, S-ro A. Rzewski, who became a member of the Lodz Esperanto Society. On the 19th the city council decided to rename a street for Doctor Zamenhof; after hot discussion in which the mayor took part favoring Esperanto.

el Neue Lodzer Zeitung

At the Fair of Lyons, as in 1917 and 1918, there was a propaganda display of Esperantajoj directed by S-ino Farges. Similar exhibitions will be arranged for the coming fairs every year, March 1 — 15 and Oct. 1 — 15. Esperantist merchants and business men are requested to send Esperanto catalogs and prospectus. Intending visitors or participants should inform the U. E. A. delegate, S-ro Poncet, or refer to the U. E. A. in addressing the Committee of the Fair.

Li — La fumado helpas mian pensadon.

Si — Kiam vi ĉesis uzi tabakon?

(Ho Ho trad.

Medanos, Argentina, has a very active Esperanto group thanks to the propaganda of S-ro Reyero.

—Argentina Esp.

The Esperantists of Montivideo, Uruguay, are now planning to put out a Bulteno.

An Esperanto edition of "Zora," the Bohemian magazine for the blind is being printed. — Progreso.

Up to the time of the reappearance of Espero Katolika, at present held up by lack of funds, the Nederlanda Katoliko will do its best to supply the deficiency. We note a considerable increase in the Esperanto as compared with the Flemish content of the monthly.

On August 18, 1919, died at Praha D-ro Stanislav Schulhof, a noted Bohemian Esperantist propagandist and translator of many beautiful Ceho-Slovak poems.

In Bromberg, Brenkenhoffstr. 13c., the Esperantists are publishing a Germana-Pola Esperantisto.

el Neue Lodzer Zeitung

In Zagreb, Croatia, the Croatian Esperanto Society has been reestablished with a membership of over 270.

The Landligo de Germanaj E. Societoj en Bohemlando has begun an active propaganda campaign by posters and movies.

In Budapest 14 E. courses with about 300 students are now going on, including Gymnasia, University and Technical High School. The ministry has officially taken over this instruction, paying some 15 Kr. per hour (Oct. 1). P. Balkanyi is in charge.

The exchange of sealed letters is now permitted with all European countries except Russia.

During the three years of the war over 1100 prisoners on the Isle of Man learned Esperanto.

The Court of the Province of Trieste has founded a special office of Esperanto translator, and chosen Prof. D. Cossars for the post.

el Neue Lodzer Zeitung

FOR THE STUDENT

TRANSLATE INTO ENGLISH

—Ekzistas en nia afero demandoj, kiuj povas esti solvataj ne de iu aparta persono, ne de iu aparta nacia asocio, ne de iu aparta institucio, sed nur de la tuta Esperantistaro.—En sia privata Esperantista vivo ĉiu persono aŭ grupo aŭ asocio estas kompreneble tute liberaj, kaj povas agi kiel ili volas kaj povoscias, sed pri ĉiuj demandoj, duboj aŭ entreprenoj, kiuj koncernas la tutan esperantan aferon, estas nepre necese, ke ni havu la eblon ĉiam scii la veran opinion aŭ deziron de la tuta Esperantistaro.—Zamenhof, 1911, Antwerp.

Work a little Shirk a little Dream a little more Mope a little Hope a little Better things in store

Fuss a little Cuss a little Something of a bore Canning budding Geniuses That's your editor.



Iomete Laboreme Iomete ne Iafoje Espereme Iafoje, Ve!

Baraktantaj
Por la sankta
Esperata tag'
Sekvu ni
La stelon
Sub la verda flag'.

Ciu Esperantisto devas legi

ESPERANTO Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio Internacia monata gazeto tute en Esperanto

16-20 paĝoj de plej bona teksto

Diverslanda kunlaborantaro

Direktoro: HECTOR HODLER

Enhavo: Artikoloj de ĝenerala intereso pri nuntempaj internaciaj problemoj, socialaj demandoj, geografio, ekonomio, scienco. — Literaturaĵoj. — Esperantismo: Artikoloj pri propagando kaj utiligo de Esperanto. — Kroniko. — Tra la gazetaro. — Tra la libraro. — Oficiala informilo de U E A. — Lingvaj Studoj. — Anonectoj, ktv.

Jara abono: Ordinara eldono, 5 Frankoj. Luksa eldono: 6.25 Frankoj Senpaga specimeno laŭ peto

Administrejo: Museumsstrasse 14, BERN (Svisio)

"THE WORLD SALESMAN"

A Monthly International Trade Journal published in Yokohama, Japan, by an American concern, with sections in English, Russian,

Spanish, Japanese, Chinese and Esperanto

THE WORLD SALESMAN is the first commercial journal to have drawn attention to the value of Esperanto as the common commercial language. It has a regular Esperanto Section and publishes the names of firms using the international language.

It will keep you posted on World Trade. If you want to do business with the Far East or any other section, IT WILL PAY YOU TO ADVERTISE IN THE WORLD SALESMAN.

Advertising Rates on application. Subscription, \$4.00 per year.

HEAD OFFICE: 76, YAMASHITACHO, YOKOHAMA, JAPAN.
HEAD OFFICE FOR THE UNITED STATES AND CANADA: NEW YORK CITY,
Roderic Penfield, Representative and Correspondent
182 WEST FOURTH STREET.

Digitized by Google